John Henry Newton,

# Bela tag'

*tradukita de Joachim Gießner*

Belegan tagon ĝuis ni.
Ho, kia rara grac'!
Nur ĝojon puran donis ĝi,
Senzorga amdonac'.

Kun jubilado de alaŭd'
Vekiĝis la maten'.
Orumis poste ĝin la sun',
La tagon en seren'.

Belega tag' en harmoni'
Pli lumas ol juvel'.
Radias, vokas: tiu tag'
Vin gvidu al ĉiel'.

Kaj kia sorto trafos vin,
Se venos zorg' kaj plag',
Por ĉiam restos la memor'
Je nia bela tag'.

Sed krom memoro tiu tag'
Ja estas multe pli:
Ĉar helpu ĝia varma am'
Dum ĉiu temp' al ni.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Ein schöner Tag" de John Henry Newton en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-613-1233 (2012-10-17 10:12:55)*

*La kolekto de poem-kaj kanto-tradukoj de Joachim Gießner troviĝas en* `C:\Users\manfredo\Documents\kanto-tradukoj deJ.Giessner.PDF`*. Vidu ankaŭ:* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner`*,*